
Esperanto 3000 vzw Leuven / Loveno Historio de la asocio de 1979 ĝis 2000

(ere arigita de Marc Vanden Bempt)

Enkonduko: arkivo 2000

Kiel ĉiu asocio kiu sin respektas ankaŭ Esperanto 2000 vzw posedas arkivon. La du plej gravaj elementoj el ĝi estas: unuflanke la raportoj pri la estrar- kaj aliaj kunvenoj, aliflanke la dosieroj pri la unuopaj aranĝoj.

En la daŭro de dek jaroj la dosieroj pri la unuopaj aranĝoj kreskis ĝis 1,5 m dika stako. Tiu stako iĝis neelĉerpebla kaj nemalhavebla informfonto: Kiam ni nun volas ekorganizi ekzemple kurson, ni nur prenu unu aŭ kelkajn dosierojn pri antaŭaj kursoj. Ĉiuj leteroj, raportoj, afiŝoj, flugfolioj ktp. Bezonitaj por la antaŭaj kursoj troviĝas ankoraŭ en tiuj dosieroj. Trafoliumantetiujn ni rapide scias kion fari por organizi la novan kurson. Tio estas interesa por rememorigi al si mem pri la farendaĵoj. Sed estas ankoraŭ pli grava kiam aliaj personoj transprenas la organizadon. La dosieroj transdonas la sperton de hieraŭ tra la hodiaŭo al morgaŭ. En aparta artikolo ni iam

prezentos liston de ĉiuj ĝisnunaj dosieroj. Ilin gardas la sekretario de Esperanto 2000.

Nun temos pri pli modesta arkivo, modesta laŭ dikeco. La dosiero kun raportoj pri kunvenoj de Esperanto 2000 estas nur pli- malpli 6 cm dika post dek jaroj. Tamen ĝi prezentas bonegan bildon super la evoluado de la asocio en tiuj jaroj.

Mi volas, kun vi, trarigardi tiun raportodosieron.

De "L.E.A." ĝis la fondiĝo de Esperanto 2000

Jam antaŭ la unua montmilito estis fondita la unua Esperanto-asocio en Leuven. La "Enciklopedio de Esperanto" (HEA, Budapeŝto 1979, represo de la unua eldono) tio okazis la 7an de majo 1903. Unu el la fondintoj en 1905 kunfondis la Belgan Ligon Esperantistan (B.L.E.).

Mi ne plu parolu pri tiuj malnovaj jardekoj.

En la jaro 1969/70 mi lernis Esperanto en la ateneo en Leuven. Tiam S-ino Meurrens estis prezidantino de la L.E.A., Kelkajn jarojn poste ŝi transdonis la prezidanteco al S-ro Michiels, kiu ĝis nun estis la lasta prezidanto de LEA.

Ion tago, fine de 1977, vizitis min iu al mi nekonita Esperantoparolanto, iu s-ro Jacobs. Jes la sama Ghislain kiun ni nun ĉiuj konas: Li vere estis Esperanto-
"parolanto": dum pli ol horo li parolis, nur en Esperanto. Ĝis tiam mi neniam parolis la Internacian Lingvon, do mi devis tre streĉe atenti por ion kompreni. Poste feliĉe tio pliboniĝis.

Ni kune decidis starigiprovan kurson en Kessel-Lo, komence de 1978, kadre de LEA. Partoprenis 5 personoj, ĉefe ni mem kaj kalkaj amikoj de Ghislain.

Post tiu kurseto, ni decidis organizi pli grandan kurson, en Leuven mem. Okazis informkunveno en oktobro 1978. Sekvis ĝin la kurso ĝis marto 1979, gvidita de Ghislain. Ĉi-foje komencis la kurson pli ol tridek personoj! En februaro ni organizis la unuan feston en Leuven. Tiu ankaŭ estis la komeco de nia libroservo (kiu startis per kapitalo de apenaŭ 200 frankoj !).

Ĝis nun ĉio okazis oficiale je la nomo de LEA. Tamen neniu el la LEA-anoj, krom Marie-Therèse Henquinez, partoprenis en la organizado. Nur laboris Marie-Therèse, Ghislain kaj mi. Simpatiis f-ino Saelemaekers, tiama kasistino de LEA.

En kunveno de LEA, la 9an de marto 1979 decidiĝis ke ni kunvoku ĝeneralan kunvenon, la 29an de marto. Sed jen krizo: la 22an de marto okazis denove LEA-kunveno. En ĝi la prezidanto kaj sekretario subite ege kontraŭstaris tiun ĝeneralan kunvenon! Laŭ ili LEA pereus se la nova teamo transprenus la agadon. Ili proponis ke ni starigu duan asocion. Ni malŝatis la ideon: ĉu ja estas ebla du asociojn vivteni per nur 60 Esperanto-amikoj? La diskuto longe daŭris, sen solvo. En la postaj tagoj s-ro Piot same esprimis sian preferon al dua, aktiva asocio.

Do restis neniu alia ebleco ol starigi tiun duan asocion. Marie-Therèse, Ghislain kaj mi alparolis la finstudantojn el la kurso. Kaj ni renkontis pozitivajn reagojn: ges-roj Comeyne (precipe Denis) kaj la geamikoj Jean-Pierre Fertinel kaj Herman Van Eyndt konsentis pri la ideoj.

Ni preparolis tion la 5an kaj la 19an de aprilo 1979.

El la raporto de la 5a de aprilo:

“La asocio devis havi nomon. Pro diversaj kialoj (facila traduko nederlandlingva, sen ‘aŭ’, neŭtrala (en la senco de la UEA-neŭtraleco), nelonga, aktiva, por Loveno kaj ĉirkaŭaĵo) s-ro Vanden Bempt proponis: Lovena Esperanto Centro (LEC.) “aŭ” Esperanto 2000. La lasta nomo fariĝis la definitiva: “ESPERANTO 2000”.

Tiel do Esperanto 2000 ricevis sian nomon...

En tiu kunveno ni preparolis la membrokaterogiojn kun BEF kaj LEA. (BEF = Belga Esperanto Federacio)

La 19an de aprilo ni krom tiujn erojn preparolis ankaŭ la kunvenolokalojn, statutojn kaj membrojn. Ankaŭ tiam ni decidis pri la fondiĝo de “kerngrupo”:

“La kerngrupo de Esperanto 2000, kiu aktivos ĝis starigo, konsistas el la ses ĉeestantoj (Denis Comeyne, Jean-Pierre Fertinel, Marie-Therèse Henquinez, Marc kaj Anne-Marie Vanden Bempt-Mommaerts, Herman Van Eyndt plus s-ino Christa Comeyne-Louage (plus eventuale s-ro De Saeytijd, s-ro Jacobs kaj s-ro Van Ostaeyen.”

Kaj fine, jaŭdon la 3an de majo 1979, oficiale fondiĝis la asocio. En la sama kunveno ni prezentis leteron de s-ro J. Verstraeten en kiu li konfirmas la akceptiĝon de Esperanto 2000 fare de la landa asocio BEF/FEL (Flandra Esperanto Ligo). Oficiale tamen tiun akceptiĝon konfirmis la FEL-estraro nur la unuan de septembro 1979.

La unua jaro: 1979

La unuan jaron de la agado karakterizas amikecaj klopodoj, amatorecaj kursoj, serĉado de agadoeblecoj, starigo de daŭraj kunlaboroj.

En 1979 Marie-therèse faris banderolon “Esperanto” ankoraŭ nun uzatan. Poste ŝi aldone faris “2000”. Hazarde ni havis la eblecon partopreni projektsemajnon en RMS-lernejo Wilsele pri Esperanto. Klaso de dekvinjaraj knaboj ellaboris ekspozicion kaj diversaĵojn rilate al Esperanto. Tiu ekspozieto troviĝis inter aliaj projektoj en semajnfina prezentado en la lernejo.

Pri la kurso ni faris reklamon precipe per afiŝoj, amatorecaj folietoj, gazetartikoloj kaj ekspozicio en la urba biblioteko. Antaŭ la kurso okazis informvespero: 11.10.1979. Al tiu informvespero venis ne nur kandidatoj por la verperkurso, sed ankaŭ s-ro Vanermen, tiutempe direktoro de la Centro por Vivantaj Lingvoj kaj sekretario de la Instituto pro Vivantaj Lingvoj, ambaŭ de la Universitato.

Li mem proponis ke ni petu al la estraroj de tiuj CLT/ILT enkonduki Esperanto-kurson. Tion kompreneble ni volonte faris, sed kun nea rezulto: oni ne konsentis pri oficiala Esperantokurso. Tamen el tio sekvis tre pozitiva rezulto ankaŭ. Ekde la jaro 1980 ni rajtis aldoni folieton kun informoj pri niaj kursoj en la informlibreto de la CLT/ILT. Ni ĝis nun ĉiun jaron denove petas kaj ricevas la permeson same fari. Duono el niaj kursanoj kontaktiĝas kun Esperanto pere de tiu informfonto!

Grava decido en tiu unua jaro estis la ekaperigo de propra revuo, kun la sama nomo “Esperanto 2000”. La unua mencio pri ĝi en raporto de estrarkunveno estis en

la raporto pri la 7.6.1979. Ni serĉis malmultekostan kopi-
aŭ presejon, preparis tekstojn, elektis datojn de aperiĝo,
decidis aperigi reklamanoncojn kaj fine preparis
(19.7.1979) la enhavon de la enkonduka numero "0". Ĝi
aperis la unuan de septembro 1979.

Post la unua varbado de anoncoj evidentiĝis ke la revuo
ne estos fonto de kostoj sed eĉ de profito: ekde malpli ol
50 membroj ĝi estos profitdona. La plej grava kialo por
aperigi ĝin tamen estis unuflanke la granda diferenco
tiama inter la poŝtmarko-afranko por presaĵo resp. revuo
kaj aliflanke la fakto ke ni volis ligi niajn gemembrojn al la
asocio pere de io konkreta. Rimarku ke tiu revuo por
multaj gemembroj estis (kaj estas) la pura kontakto kun
Esperanto 2000, ses-foje en la jaro!

En la daŭro de 1979 forfalis jam la unuaj du estraranoj:
Denis kaj Christa Comeyne-Louage. Poste ili transloĝiĝis
al alia provinco kaj ni bedaŭrinde plene perdis la
kontakton.

En la raportoj de la kunvenoj en 1979 kelkfoje troviĝas
mencio pri LEA ankoraŭ: ili provis organizi propran
kurson sed la unuan lecionon (10.10.1979) ĉeestis nur du
kursanoj kaj ses Esperantistoj, inter kiuj mi mem. Poste ni
petis al ili pri iliaj planoj rilate al la Semajno de la
Internacia Amikeco (SIA) en 1980, por ke ni ne ĝenu unu
al alian. Evidentiĝis ke la menciita kurso estus la lasta
aktiveco de LEA. Hodiaŭ ĝi tute ne plu aktivas.

En la raporto de la 15.11.1979 troviĝas: "Eblas ke la
junularkongreso de 1982 estu en Loveno se ni povos
aranĝi ĝin! Sed ĉu ĝi ne kostos tro? Ni baldaŭ preparolu

tion kun K. Tytgat. Tiu ĉi lasta (aŭ ŝia fratino) povos veni la 29an, se ni deziras tion.”

Iniciatis tion Jean-Pierre. La 29an K. Tytgat ĉeestis; ni legas: “La propono pri la junularkongreso 1982: favora tendenco inter ni.”

En la sama raporto troviĝas ke la kaso enhavi tiam 1.800 Bf. Ridinde malmulte, sed tamen jam la duono de la kasenhavo de la UEA unu jaron antaŭe!

Antaŭ la fino de 1979 ni jam kontaktis la universitaton pri kongreslokaloj kaj la urbo pri subvencio. Tiel preskaŭ nerimarkite, ni komencis la grandan aventuron organizi kongreson kiu bezonos buĝeton pli ol unu milionan...

Alia grava sukceso ankaŭ datiĝas el 1979. Post kelkaj negativaj provoj Jean-Pierre sukcesis konvinki la ĉefojn de la urbobiblioteko ke ili aĉetu Esperantolibrojn. Ili unue promesis en 5 jaroj aĉeti po pli-malpli 100 libroj je prezo de 10.000 Bf jare. Nia libroservo aranĝis la aĉetojn (ĉe UEA kaj Sonorilo) por ili, kun eta monprofito por la grupo. Antaŭ ol fini tiun aĉetadon la urbo estis aĉetinta ion malpli ol 500 libroj je suma prezo de +-70.000 Bf! Ili nun haveblas en la biblioteko. Pri ili haveblas senpaga plena katalogo (kunmetita de Ghislain) en la biblioteko mem. Petu ĝin: Vanderkelenstraat 28, 3000 Leuven

Semajno de Internacia Amikeco, dekfoje

En antaŭa ĉapitro ni jam menciis la organizadon de la unua festo rilate al la Semajno de Internacia Amikeco en februaro 1979. Ĝin organizis nome de LEA la postaj estraranoj de Esperanto 2000. Ni tial kalkulas ĝin kiel unua festo de Esperanto 2000 mem. En 1980 kaj 1981 ni organizis festojn tutsemajnajn: ekspozicion kun kelkaj prelegoj (en Esperanto), filmprezenton, diaseriojn, k.s.. En februaro 1982 ni en Leuven havis fotoekspozicion pri

Hiroŝima kaj Nagasaki 1945. Ĝi daŭris la tutan semajnon. Dimanĉe ni organizis kelkajn prelegojn kaj filmojn en Esperanto. Ĝeestis tiam +-70 Esperantistoj. Tio estis la komenciĝo de pli strukturita festado en unu tago: unue dimanĉe, poste sabate. La deka kaj provizore lasta eldono en nia urbo estis en februaro 1988. Ni petis alian asocion transpreni la organizadon. En 1989 la festo iris al Bruĝo. Ankaŭ la poŝtajn jarojnĝi verŝajne okazos en la flandraj provincoj. Ni tamen bedaŭras ke la festo en 1989 kostis tiom multe (600 BF!). En Leuven ĝi 10-foje estis senpaga kaj tamen en la lastaj jaroj ni ĉiam havis plumulfrankan profiton...

La jaroj 1980 ĝis 1982

La jaron 1980 karakterizas speciale la bazaj preparoj por la IJK. Ni komence de la jaro havis plurajn laborkunsidojn inter la estraro kaj respektive Fleja, FEL, Tejo, antaŭaj IJK-organizantoj en Nederlando. El tiuj sekvis multaj ideoj, tuta labordosiero, buĝeto, konkretaj kontaktoj kun diversaj instancoj, la temo (scienco kaj tekniko) , unua informilo, k.a..

Legu pri tio poste.

Fine de 1979 ni decidis aliĝon de Esperanto 2000 al la kulturkonsilantaro en Leuven. Tiun aliĝon ni ricevis en 1980. Ĝi rajtigis nin je subvencioj de la urbo. Komence tio estis nur 300 BEF jare, maksimumo ĝisnuna estis ĉirkaŭ 15.000 Bf en unu jaro. Por tio ni jes devas prepari ampleksan 'subvencidosieron' ĉiujaran kaj ĉeesti kelkajn kunvenojn de la Konsilantaro. En marto 1980 ni organizis skriban kurson. Ĝi ne estis la sama kiel la nuna: pli simpla, pli amatoreca, pli malmultekosta. Sed estis ja komenco.

Ekzitis jam embrio de gazetara rebatservo. El la raporto pri la 24.4.1980: "Knack": en ĝi aperis artikolo pri tradukkomputoreto: ni reagu, laŭvice: MV, HV, MVH, MTH, JPF".

VVVV Leuven - 7° GAMBRINUSFEESTEN LEUVEN	
Tiensevest 170	28-29-30-31 mei 1981
3000 Leuven	IN HET TEKEN VAN:
Tel: 016/22.93.50	"ROND DE LEUVENSE STOOFF"
	UITNODIGING

En 1980 ni unuafoje povis partopreni Gambrino-festojn en la urbo parko. Tion ni ĉiun jaron (krom 1983 kaj 1988: bierfestoj...) faris ĝis nun. Temas pri kvartaga laborado en trinktendo (? drikcento), kies profito parte estas por la grupo. Bedaŭrinde la maksimuma profito ĝisnuna estis ĉ. 15.000 Bf. Kelkfoje estis eĉ tute neniu profito, pro malbona vetero. Ni ege bezonis tiun monon precipe en la unuaj jaroj!

En la ĝenerala kunveno de la 8.5.1980 ni decidis ne plu paroli pri "kerngrupo", sed pri "estraro". Estraranoj tiam estis: J.P. Fertinel (prezidanto), M.Th. Henquinez (vicprez.), M. Vanden Bempt (sekretario), Gh. Kaj P. Jacobs-Vanhelmond kaj A.M. Vanden Bempt-Mommaerts (estraranoj)

Pri la financoj: en la raporto de la 24.7.1980 ni legas ke la ŝparkonto enhavis jam 14.335 Bf. Precipe el la unua Gambrinofesto...

Ekde 1981 la dosiero kun raportoj klare montras ke la agado iomete suferas sub la organizado de la IJK. Okazis malpli da estrarkunvenoj kaj la raportoj pri tiuj

kunvenoj ne meritis multan atenton: tre mallongaj, eĉ kelkaj kune sur unu folio... Sed ekzistas aparta dosiero pri la (oftaj!) kunvenoj de la LKK (Loka Kongreso Komitato) kaj de ties kernestraro. En tiuj kunvenoj ni ankaŭ ĉerande preparolis la kutimajn aferojn de Esperanto 2000. Do ne necesis multaj apartaj estrarkunvenoj. Komence de 1982 ni faris unuan provon por starigi monatajn grupkunvenojn. Ili okazis ĵaŭde ekde la 28.1.1982, ĉiunmonaton krom en julio kaj aŭgusto. El tiu provo poste ekestos la nunaj Vesperoj 3000.

38a I.J.K. en Leuven, 31.7 - 7.8. 1982

Kiel supre skribite, ni fine de 1979 ekorganizis la IJK'n de 1982.

linter la unua ideo (15.11.1979) kaj la duono de 1980 ni priesploris le eblecojn. Precipe ni interesiĝis pri la demando ĉu entute tiom grandskala enterpreno eblis por tiom juna kaj eta loka asocio. En julio 1980 ni, rezulte de tio, oficiale invitis la Kongreson al Leuven.

Ni intertempe jam faris plurajn provbuĝetojn, el kiuj sekvis meza kotizo. Depende de la supozoj, informoj pri konkretaj prezoj kaj taksoj pri la nombro de ĉeestantoj, tiu meza kotizo tre variis. Iel unu el tiuj neoficialaj provbuĝetoj venis en la manoj de eksteruloj. Hazarde en tiu estis menciita tre alta kotizo. El tio sekvis ribela artikolo en la germana revueto por la Esperantojurnalo. Ĝi eĉ alvokis la germanojn al bojkotado de la IJK en Leuven! Ni decidis tute ne reagi al tiu artikolo. Tamen rezulte de i.a. tiaj bruoj, ni fiksis kotizon tre malaltan. Preskaŭ ne eblis, laŭ ni tiam, organizi tiel profitdonan kongreson...

Tamen ĝi ne rajtis kaŭzi perdon! Nia asocio estis tre malriĉa kaj do ne povis elporti gravan perdon. Tial ne tre dubis ĉu Esperanto 2000 entute akceptu la finanĉan riskon. TEJO ĉiuokaze havos duonon de la gajno aŭ malgajno. La alia duono estos aŭ por Fleja, aŭ por Esperanto 2000, aŭ por ambaŭ. Post longdaŭraj diskutoj kaj meditado ni decidis ke Fleja havu kvaronon kaj Esperanto 2000 kvaronon de la gajno aŭ malgajno. Feliĉe gajnon ni havis, eĉ sufiĉe altan! Sed ni ja tre bone kontrolis la buĝeton kaj forstrekis ĉiujn eblan altajn elspezojn. Krome ni havis neantaŭviditajn enspezojn. Ekz.: ne ĉiu partoprenanto manĝis ĉiufoje. Do ni ne devis pagi tiom da manĝoj kiom antaŭvidite.

Ĉiuj menciitaj preparoj okazis de la estraroj de Esperanto 2000. Nur la 9an de marto 1981 ni dissendis leteron al pli granda grupo por inviti ilin al kunlaborado en la LKK (Loka Kongresa Komitato). La leteron enhavis liston de la farendaj taskoj kaj jam unuan programskizon.

La unua kunveno de la LKK okazis la 18.3.1981. Ĝeestis jam 14 personoj. Poste aldoniĝis ankoraŭ multaj aliaj kandidatoj, tiel ke almenaŭ 30 personoj kunorganizis la kongreson.

En la kunveno de la 20.8.1981 ni fine decidis pri la kotizotabelo. La kotizoj variis inter 210 kaj 420 guldenoj, meze 260 gld. Tio inkluzivis loĝadon, manĝadon kaj tutan programon. La sumo de la buĝeto estis 1.327.000 Bf. Post tio eblis presigi la unuan informilon, tial ke la verbado povis komenciĝi.

En la LKK-kunveno de la 19.10.1981 ni dividis la taskojn kaj proponis laborskemon. Principo estis ke kerngrupo

sci pri ĉiuj decidoj kaj laboroj. Aliaj LKK-anoj regule raportu al tiu kerngrupo. Ili inter si interŝanĝu ĉiujn informojn. La kerngrupo konsistis el tri estraranoj de Esperanto 2000: Jean-Pierre, Herman kaj mi.

Kaj tiel la konkretaj preparoj komenciĝis. Inter oktobro 1981 kaj julio 1982 ni starigis la tutsemajnan programon, ekskurson, informkampanjon al gazetaro, oficialajn rilatojn, ktp. Tre multa laboro, sed kun bona rezulto. La kongreso tre bone sukcesis, la vetero estis sunplena (krom duonon tagon), ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj. Pri tio vi legu ĉion en la “Memorlibro pri la 38a IJK en Leuven”. Aĉetu ĝin ĉe nia libroservo aŭ ĉe FEL!

Kio plej gravas estas ke post la IJK la agado de Esperanto 2000 ne finiĝis, sed ke ĝi eĉ pli fortiĝis. Kontraŭe al la spertoj ĉe antaŭaj IJK-organizintoj...

La jaroj post la IJK

Tamen ne bone komenciĝis: Jean-Pierre ekŝiĝis el la estraro, en kunveno de la 10a de novembro 1982. La raport(et)o parolas pri “krizo” en Esperanto 2000. La (praktika) estraro nun konsistis el Herman, Ghislain, Marie-Therèse kaj mi.

Fine de 1982 ni unuafoje provis pli strukturigi la agadon. Ghislain iniciatis la unuan stukturon de Vespero 2000: monata kunvebo kun parolata ĵurnalo, ĉefprelego, eble ludo kaj/aŭ gramatika ero kaj postbabilado. La 2an de aprilo 1983 okazis la unua tia Vespero 2000.

Ni tiutempe ankaŭ strukturigis la librotenadon aŭ almenaŭ provis ĝin strukturigi. Ni ellaboris kotizsistemon, formularojn, internajn fakturojn kaj petis AVI-numeron.

Tamen por havi bonan funkciantan librotenanon ni devis ankoraŭ atendi ĝis kiam Luc Rijnders spertiĝis.

La raportoj de la estrarkunvenoj en 1983 estas mirige koncizaj. Aŭ prefere: min tio ne tro mirigas... Tuj post la IJK en 1982 mi jam komencis prepari alian kongreson. FEL volis rekomenci novan serion de kongresoj en Flandrio. Ni iniciatis tiun serion. En septembro 1983 en Leuven ni organizis “Esperanto-kongreson pri Internacia Komunikado”. La kongresa kontonumero ĉe FEL ricevis la kodon “ekik-v”: laŭ tiu kodo ni eĉ nun konas la kongreson. Estraranoj parolas pri “IJK”, “2000”, “ekik-v”, “edumk” (= kontonumero de Esperanto 2000) kaj scias pri kio temas...

La FEL-kongreso sukcesis, kvankam miaopinie ne tro: ĉeestis nur inter 60 kaj 70 partoprenantoj. Komparu tion kun la 350 de la IJK... Sed jes, estis nur nacia kongreseto.

Finance ankaŭ ĝi estis negativa: ĝi kaŭzis perdon pli ol 10.000-frankan. La kontrakto kun FEL enhavis tekston laŭ kiu okaze de gajno duono estis por FELkaj duono por Esperanto 2000, okaze de perdo FEL ĝin plene pagu. Tamen Esperanto 2000 ne volis ŝovi tiun perdon al FEL kaj eĉ plene pagis ĝin mem...

La ĝenerala kunveno de la 14a de marto 1984 estis speciala. Okazis du gravaj ŝanĝoj. Unua estas ke la estraro renoviĝis denove: Ghislain, Marie-Therèse, Herman kaj mi restis; aldoniĝis Luc Rijnders kaj Françoise Guldentops (la gepatroj de Jeroen). Poste Herman eliris la estraron, ĉar li transloĝiĝos al Antverpeno; kaj Marie-Therèse eliris transloĝiĝinte al

Oost-Duinkerke. Denove: "Leuven zendt zijn zonen (en dochters) uit!". Fine en 1985 Ghislain eliris kaj Carl Deseure alfortigis nian grupon. Tiel ekestis la estraro ĝis-1989-a.

Dua decido de tiu kunveno estis ŝanĝi Esperanto 2000 al aspc ("vzw" nederlande). Ni estis verkintaj (koncizajn) oficialajn statutojn, kiuj nur post jaro (25.4.1985) povis aperi en la ŝtatgazeto. Françoise iĝis vicsekretariino: ekde nun la raportoj de la estrarkunsidoj denove estis tre bonaj kaj regulaj kaj detalaj...

La nova estraro okupiĝis pri aliaj stukturadoj. Inter aliaj estas la jena:

- aktivecraporto kaj planado de la jaraj aktivecoj por la ĝenerala kunveno;
- buĝeto, poste ankaŭ finkalkulo, por la ĝenerala kunveno;
- diplomoj por nia kursanoj, kun superrigardo de la diplomitoj;
- surpaperigitaj metodoj kaj vortlisto resp. lernlibro por la vesper- kaj rapidkursoj;
- asekuro por civila respondeco k.a.,
- ni elektis novan eblemon (la nunan), leterpaperon, stampon, k.s.;
- la librotenado fine ekestis detala kaj komplete fidinda,
- la membroadministrado fine iĝis senerara, laŭsisteme kontrolata;
- ni kunmetis kaj poste renovigis lumbilddosieron kaj -prelegon pri Esperanto.

En 1984 ni sukcesis havi informbudon en la unua (kaj ununura) librofoiro en Leuven kaj en lerneja ekspozicio. Ni havis prelegojn en la provinca normallernejo en Leuven kaj alternativan kurson ĉe Doppersatelier..

Ankaŭ en 1984 ni ellaboris la bibliotekon de Esperanto 2000. Komencis ĝin granda librodonaco de Marie-Therèse Henquinez.

Komence de 1985 ni surpaperigis unuan provon de principaro, pri informado. Poste ni pli profunde, pritraktis tiajn principojn. Nur fine de 1987 nia principaro iĝis preta laŭ unua plena teksto. Ni nomis ĝin “gvidliniaro”. Ankaŭ estonte ni devos ĝin daŭre adapti, por ke ĉiu estrarano sciu ĉiam laŭ ĉiuj principoj disvolviĝu la aktivecoj de la asocio.

En la jaroj 1985/86 kaj 1986/87 okazis daŭriga kurso, laŭ sufiĉe severa sistemo. Poste ni ŝanĝis tion al “laborvesperoj” unufoje monate. Tiuj okazis en la du postaj jaroj. Kutime nemultaj homoj ĉeestis. En la postaj jaroj tiuj laborvesperoj ne okazis.

Ni helpis la starigadon de nova loka asocio en Halle. Plie Carl kaj Françoise eniris la estraron de Fleja. Mi transprenis la administradon de la FEL-manlibro por Esperanto-aktivuloj. Do estas klare ke ni ne lemigis nin al loka agado ĉi-urba aŭ ĉi-grupa, sed ankaŭ kunlaboris en aliaj lokaj aŭ niveloj.

10-jara

Tiel la asocio iĝis dekjara.

Jam multao okazis en tiuj jaroj. El eta kerno kreskis konstante firma asocio, kun fortaj financaj kaj gemembraj bazo kaj strukturo.

En la ĝenerala kunveno en 1989 eblis trovi kelkajn aktivulojn kiuj transprenos specialajn taskojn. Tio malpli ŝarĝis la estraranojn.

Plej gravis en la sekvaj jaroj ke la starigita konstruo “Esperanto 2000” ne detruigu. Ni gardu la asocion vivanta, eĉ se ne kreskanta. Kaj al tio kontribuu ĉiu membro, per ĉeestado regula de la por-via Vespero 2000!

Estis kaj restis ja tiom farenda por disvastigi Esperanton en Leuven, en ties ĉirkaŭaĵon, en la mondon. Esperanto 2000 estu ĉenero en la daŭra disvastigado de la internacia lingvo...

ESPERANTO 2000 v.z.w.

La dua jardeko en la vivo de Esperanto 2000/3000

De la deka ĝis la dudeka datreveno de la fondiĝo de Esperanto 2000 sufiĉe multo okazis. Ni prezentas tion surbaze de trarigardo de la revunumeroj de 1989 ĝis la jaro 2000.

Konstanta agado

Estis konstanta agado en tiu tuta periodo. Ĝi konsistis precipe el:

- ☆ Vespero 2000 en la dua merkredo de la monatoj septembro ĝis junio; ĉeestis gastoj el Francio, Nederlando, Pollando, Kubo, Dagestano, Germanio, Grekio kaj pluraj aliaj landoj de la mondo; nia ‘ora libro’ prezentas kelkajn el ili;
- ☆ informvespero antaŭ la kursoj, duone de oktobro;

- ☆ rapidkurso kutime en la dua duono de oktobro; en la jaro 1999 escepte okazis eĉ kvin rapidkursoj (!) inter kiuj unu por Bekina kaj unu por Mensa;
- ☆ koresponda kurso kaj kurso por memstudado;
- ☆ vesperkurso, de oktobro ĝis marto aŭ aprilo;
- ☆ la necesaj estrarkunsidoj;
- ☆ libroservo, intertempe kun stoko je valoro de pli ol 2.500 eŭrojn, akirita (nur) pere de la malgranda profito el la multaj venditaj eroj tra la jaroj;
- ☆ propraj eldonoj, kiel hungara lingvokurso (Maria Ballendux-Bogyay & Marc Vanden Bempt), Parolturnaro Esperanta-germana (Hans & Kerstin Wiersch), sed ankaŭ aperis multaj aliaj, malpli dikaj libroj kaj broŝuroj; en 1999 ni aldonis al tio ankaŭ propran aŭtomatan krajonon je plurcent ekzempleroj;
- ☆ biblioteko, intertempe kun pli ol 500 eroj.

La revuo

La revuo Esperanto 2000 regule aperis 6 fojojn en ĉiu jaro. La prezo de poŝtmarko en tiu periodo bedaŭrinde plialtiĝis de la komencaj 0,60 BEF al 7,50 BEF! La redaktoroj estis Luc Rijnders ĝis la fino de 1990. Tiam Marc Vanden Bempt transprenis ĝin, en 1993 Felix Neefs faris du numerojn sed bedaŭrinde ne povis daŭrigi. Do rekomencis Marc kiel 'unufoja' kaj poste 'portempa' redaktoro... Komence de 2001 fine aperis nova redaktoro en la vico: Koen Vanhoof.

Komence de 1990 ekaperis mistera aŭtoro Utopia en la revuo. De tiam en preskaŭ ĉiu numero aperis unupaĝa 'peceto'. Kaj la identeco ĝis la dudekjariĝo ankoraŭ ne estis malkovrita. Komence de 1991 aperis la unua 'jarlibro'. Tiu de tiam reaperis en ĉiu jaro, sen escepto. Ĝi provis ĉiufoje doni superrigardon de la pli gravaj eroj en

la vivo de Esperanto 3000, kiel praktika gvidilo por la gemembroj.

Ni ankoraŭ menciis ke ni aldonis senpagan okulvitron por la suneklipso en 1999.

Grupkunvenoj

Komence de 1989 aperis unuafoje la nomo de 'Laborvespero'. Tiel ekde tiam nomiĝis la daŭriga kurso, kiu konsistis el apartaj lecionoj kaj kiu poste iĝis regula duonmonata kursovespero kiu aldoniĝis al la monata Vespero 2000.

Vizitis nin plurdeknombraj grupoj el interalie Pollando kaj Hungario. En 2000 Kroata trupo prezentis la pupteatraĵon 'La eta princo'.

Aliflanke niaj gemembroj vizitis plurajn internaciajn kunvenojn. Pensu nur pri la Internaciaj Seminarioj kaj Internaciaj Festivaloj, la Internaciaj Junularaj Kongresoj, Universalaj Kongresoj, OSIEK-konferencoj, landaj kongresoj en Francio kaj Italio, Faulhaber-semajnfino kaj aliaj. Kaj ni unufoje perbuse kaj plurfoje aŭtokaravane veturis al la U.E.A.-Centro en Roterdamo.

La reto

En 1999 ni komencis uzi la reton, unue por komunikado tra nia adreso esperanto3000@esperanto.nu (pri tiu 3000 ni poste klarigos) kaj poste same @esperanto.be. En 2000 aperis nia novaĵletero interreta. En 2001 la propraj retpaĝoj estis publikigitaj kaj alireblaj de la retpaĝoj de FEL per simpla adreso

<http://www.esperanto.be/esperanto3000>.

En 1999 ni eklaboris por inviti la IEK 2002 (konferenco de OSIEK) al Loveno. Somere de 2000 la invito estis oficiale

akceptita kaj komence de 2001 jam antaŭaliĝis dudeko da konferencanoj.

Aktivecoj rilate al FEL

Kadre de la S.I.A.-festo en 1994 (legu sube) ni organizis laborsesion por FEL (Flandra Esperanto-Ligo). Ankaŭ aliokaze ni laboris por FEL. Estis strategia kolokvo en 1994, nova strategia plano kaj pridiskutado en 1997/8, esploro pri la aktivecoj komence de 2000 kaj ankaŭ en 2001 nia grupo ankoraŭ helpas al FEL plibonigi la agadon en la Esperanto-centro. Ni ne forgesu ke tie pluraj oficistoj dediĉas sian vivon al Esperanto kaj ke ankaŭ Esperanto 3000 el tio daŭre profitas.

La Semajno de Internacia Amikeco

La Semajno de Internacia Amikeco estis ĉiujara ĝis 1988. Poste transprenis unu- aŭ dufoje aliaj grupoj kaj la afero dum kelkaj jaroj ŝajnis forgesita en Belgio. Tion ni ne povis lasi tiel kaj do ni decidis en 1994 denove organizi la feston en Loveno. Ĝi iĝu dujara inaŭgura festo, kiel antaŭe: invitoj al la tuta Belgio, tuttaga programo senpaga, malmultekosta vespera bufedo (inter 6 kaj 8 eŭrojn), speciala numero de nia revuo kun surprizo kaj ofte ankaŭ alia surprizo. Tiel en 1994 ni povis inaŭguri samtempe Esperanto-avenueon kaj Zamenhof-straton. Ankaŭ ni tiam prezentis unuafoje nian Esperanto-bieron. En postaj jaroj aperis aliaj tiaj bieroj. En 1996 ni aperigis 6 diverstipajn Esperanto-glasojn, en 2000 ni plantis Esperanto-arbon en la centro de la urbo. En la neparaj jaroj ni ankaŭ okazigis inaŭguran S.I.A.-feston, sed tiam malgrandskale, nur por niaj gemembroj kaj specialaj gastoj. Tio estis promeno kaj poste vespermanĝo en restoracio.

Ni intencas ankaŭ en la sekvaj jaroj daŭrigi la festadon de la Semajno laŭ la sama maniero. Esperanto 3000 estas unu el la plej fervoraj festantoj de tiu Semajno.

Kaj aliaj festoj

Nu jes, festado iĝis vere nia specialaĵo. En la decembra Vespero 2000 ĉiam ĉeestas senpagaj tortoj por la gastoj, okaze de Zamenhoftago. En la junia vespero estas senpaga trinkaĵo, okaze de la laste Vespero 2000 de la laborjaro.

En majo 1999 ni jubilee festis la dudekjariĝon de Esperanto 2000. En la sama tago ni plenumis neoficialan promeson de la komenco: la asocio akiris sian novan nomon, Esperanto 3000. Tio estis okazo por denove iom abunde aperi en la gazetaro. La urbestro Tobback daŭrigis la tradicio kiun lia antaŭulo, s-ro Vansina, ĉiam tre bone flegis ĉeeston kaj pozitivan paroladon en niaj specialaj aranĝoj. Nu, s-ro Vansina estis vere tre fervora, sed ankaŭ s-ro Tobback ĉiam esprimiĝis sufiĉe pozitive rilate al Esperanto kaj Esperanto 3000.

Ni jam akiris la promeson de s-ro Tobback ke li oficiale akceptos nian asocion en la urbodomo okaze de nia 25-jara jubileo en majo 2004.

La aktivuloj

Post la estrara periode de Carl Deseure (ĝis 1993), Bert Vanhoven (ĝis 1994), Luc Rijnders (ĝis 1990) kaj Ghislain Jacobs (ĝis lia forpaso en februaro 1992), en 1993 transprenis la sekretariecon Roger Goris. Li iĝis la motoro de la asocio ĝis kiam lia sanstato ne plu permesis ĝin, post ĉirkaŭ 20 jaroj. Aldoniĝis poste Frans Croon (1994) kaj Bart Demeyere kiu dum jaro estis prezidanto. Tiuj, kun Martin Decaluwe kaj flanke de la estraro Marc

Vanden Bempt, gardis la asocion viva, ĝis al alveno de novuloj: Myriam Van der Steen en 1996, poste ankaŭ Denise Quintiens kaj Gabi Smets.

Ĉiuj tiuj personoj ankaŭ alportis novajn ideojn kaj sangon. La asocio en la dua duono de la naŭdekaj jaroj denove travivis viglan periodon. Tamen fine de 1993 ankoraŭ devis aperi alarma mesaĝo de Ghislain en nia revuo, kiu petegis pri helpo.

Nepre menciindas ke la administrado de la gemembroj, revu-adresoj kaj financoj fine estas tute en ordo.

Ni ne provos nomi ĉiujn aliajn aktivulojn el tiuj jaroj, tamen jes Helga kaj Joris Raeymaekers- Van der Biest, Emma Meulenbergs, Paul De Cooman, Henri kaj Julia Castiau- Maes. La multegajn aliajn ni ne mencios sed jes same dankas kaj ni esperas daŭre revidi ilin!

Fine ni nepre menciu la grupojn de Halle kaj Köln (kiuj intertempe malaperis) kaj la grupoj de Tienen kaj Londerzeel (kiuj nun tre viglas): ĉiuj havas sian originon en Esperanto 3000 en Loveno! Ankaŭ la unua EKO (Esperanto-Kafejo) estis organizita (de Nele Hiers) en Loveno.

20-jara

Estas do klara ke Esperanto 3000 jam travivis kelkdek sukcesplenajn jarojn kaj post 20 jaroj estis je la sojlo de longa aktivado. La celoj estis ankoraŭ ambiciaj, rilate al ekzemple la membronombro, Esperanto-kono de la gemembroj, informada aktivado, oficialigo de kursoj, grandaj kunvenoj (Semajno de Internacia Amikeco, Lingva Festivalo kaj poste HungaroMania, Osie-kongreso 2002) kaj multaj aliaj.

Ni invitis ĉiun kune plue tiri la ĉaron en la trian jarmilon.